



# La 2-a ILEI-Seminario en Orienta Azio

[Ĉeftemo---Instrumetodo por azianoj]

JULIO

JUNIO, 23, 2012

KUNMING, ĈINIO



**Komunaj Organizantoj:** Ĉina, Japania kaj Korea sekcioj de ILEI

**Aŭspicianto :** Ĉina sekcio, ILEI

**Dato:** 23 julio, 2012

**Loko:** La Profesia Artkolegio de Kunming, Ĉinio

**Ĉeftemo: Instrumetodo por azianoj**

**Programero**

14:00-14:20 Malfermo

(1) Parolado de ILEI-prezidanto

(2) Parolado de Japania sekcio

(3) Parolado de Korea Sekcio

(4) Parolado de Ĉina sekcio

(5) gratuloj de aliaj landaj sekcioj.

14:20-15:10 Prelego: Efiko de parkera metodo, Yongsung PARK(Nema), Koreio

15:10-15:30 Prelego: Interesaj metodoj por instrui Esperanton al infanoj, Prof. Li Weilun, Ĉinio

15:30-15:50 Prelego: Hori jasuo, Japanio

15:50-16:15 Kafpaŭzo

16:15-16:35 Prelego: Ĉu Cseh-metodo taugas por komencantoj en Ĉinio? Liu Baoguo, Ĉinio

16:35-17:00 Prelego: Signifplena provo de esperanta instrudao por ĉinaj infanoj, Wei Yubin, Ĉinio

17:00-18:00 Diskutrondoj kaj konkludoj, fermo

Prezidanto: Yongsung PARK (Nema) el Koreio



## Salutvortoj

**Stefan MacGil, prezidanto de ILEI**



Mi tre ĝojas havi la okazon malfermi la 2-an renkontiĝon de la orienta azia regiono. Mi vidis la bildojn kaj fotojn de la 1-a, kaj tiuj estis tre imponaj. Nun kadre de la konferenco okazas la dua ISOA.

Azio estas kontinento kie la instruado de Esperanto povus esplori, povus ampleksiĝi multe, la eblo ĉi tie

estas pli ol ni kapablas plenumi. Ni vidas grandan kreskon en la aktiveco de niaj aziaj sekcioj kaj estas amaso da spaco por plia kresko. Ni havas tradicie 3 sekciojn, ĉi tie ni havas korean, ni havas ĉinan, ni havas japanan, evidente la japana estas la plej longviva kaj la ĉina kaj la korea ambaŭ stariĝis, pli malpli mortis dum pluraj jaroj, kaj ambaŭ feliĉe preskaŭ en la sama momento antaŭ ĉirkaŭ 3 jaroj reviviĝis kaj fortiĝis, kaj nun havas membro-nombrojn pli ol iam ajn antaŭe kaj ankaŭ pli intensan agadon. Do ni havas pli ol 30 membrojn en Koreio, kaj en Ĉinio ni havis en la komenco de la konferenco 84 membrojn kaj ni aŭdis, ke ni jam atingis 89, do ni estas survoje al tiu punkto havi sekcion kun 100 membroj. La estraro decidis, ke tiu sekcio ricevos premion, la unua kiu transiros al la celo 100, do, ni bondeziras al Azio, ĉar vi havas nun unu la alian konkursan sekcion, la unua kiu estas Germana, kaj ambaŭ vi strebas por atingi la 100. Do estas tre grave en viaj laboroj, ke vi solvu fakajn problemojn. Tio estas la celo hodiaŭ, sed ankaŭ ke organize vi fortiĝu kaj sukcesu multigi la nombron de membroj kaj ankaŭ la agadon kaj la eblojn por gvidi kursojn, precipe internaciajn aranĝojn. Feliĉe tiuj multiĝis en la lastaj jaroj kaj tio estas la sekreto aŭ sukceso penigi homojn trans limoj kiuj ne havas komunan lingvon, krom Esperanto. Tiam la lingvo vere vivos, la homoj bone progresos.

Do, daŭrigu en tiu vojo, fortigu la tri grandajn sekciojn. Sed memoru, ke Azio ampleksas ege pli ol tiuj tri landoj, kaj estas grandaj ebloj mi esperas, ke ĉi tiu kunsido konsentos fortigi la agadon en la aliaj landoj. Ĉar pluraj el ili estas maturaj por fariĝi sekcioj, maturaj por nomi prezidentojn aŭ kontaktan personon, nur necesas iom da puŝo, iom da agado por ke tio okazu. Ni kun granda ĝojo povas anonci, ke ni sukcesis akiri sekciojn en Vjetnamio kaj Mongolio, sed ili bezonas fortigon, ĉar ili havas malmultajn membrojn ankoraŭ nun kaj ankoraŭ la movado kaj instruado estas en komencaj fazoj. Do, la fortaj sekcioj devas tre



aktive helpi al tiuj aliaj novaj sekcioj, kaj baldaŭ ni havas ŝancojn havi eĉ plian sektion.

Post tiuj 3 landoj, eble estas en la dua vico, ni ankoraŭ havas la trian vicon, kun multaj eblecoj. En Indonezio, ekzemple okazas multo. Okazis plurfoje vojaĝoj de Heidi Goes el Belgio, kiu atingis grandajn sukcesojn en preleg-vojaĝoj, kursoj kaj ĉio, el tio devas esti la ĝermo por sekcio. Nur bezonas tian puŝon kaj estus plibone, se tiu puŝo venus de Azio, kaj ne nur el Eŭropo de for aŭ de ILEI. Vi konas la kontinenton pli bone ol mi, faru por ni miraklon ankaŭ en Indonezio. Atingu tian nivelon

En Tailando estas almenaŭ unu konata aktivulo eble eĉ du. Vi verŝajne scias pli ol mi, pri ĉi tiaj aferoj, mi havas reprezentanton el Pakistano, kiu volas fondi sektion tie kaj fari bonan laborplanon pri tio. Ni komprenis, ke ni devis fariĝi konferencano. Tio estas fleginta lando, ankaŭ Hindio, la unua granda lando de la mondo estis iom absurde, kvankam ili havas objetivajn obstaklojn kaj eĉ ni ne havas pli ol reprezentanton en Hindio. Tio devus fariĝi sekcio. Do, ni bezonas homojn por labori pri tio. Tiuj estas la landoj kiuj venas el mia menso tuj, se ankaŭ estas la novaj respublikoj el la siatempa Sovetunio, Uzbekstano, Kazakstano. Ĉiuj el tiuj estus tie, havas Esperantajn movadojn kaj eblus ankaŭ tiajn memori, ke Azion ankaŭ inkluzivas ILEI. Oni povus ankaŭ tiel iom fari. Mi esperas, ke estas iu labor-peto, Azia laborplupeto, kiu okupiĝus pri tiuj demandoj, helpus la estraron de ILEI por havi novajn sekciojn, novajn reprezentantojn. Estu pli fortaj aferoj ĉi tie.

Do, mi fermu miajn komentojn pri la temo 'Kiel instrui efike Esperanton al Azianoj'. Mi nur diru tiel: rigardu la ecojn de Esperanto mem, Ne rigardu ĝin tra la prismo de naciaj lingvoj, vidu la unikan strukturon, vi trovos surprize multajn similecojn inter Esperanto kaj la aziaj lingvoj. Ne je la leksika kampo evidente, se en la struktura kampo la maniero kiel oni konstruas elementojn por formi la frazojn. Tio havas aziajn elementojn kaj vi povas esplori. En via instruado ĉiam devas esti, gravan rolon devas ricevi la parola lingvaĵo, viaj kursoj devas kuraĝigi al la homoj ne timi sed esprimi sin aktive en la nova lingvo. Vi devas starigi etoson de Esperanto-komunikado en la nivelo de la lerniga materialo, sed ĉiam en Esperanto. Mi esperas, se estos loko en la programo, ni povas doni kelkajn konkretajn ekzemplojn, kiel tio povus funkcii.

Do, pensu pri tiuj temoj, transsaltu al la spirito de Esperanto kaj tiel vi provos la ŝlosilon plibone instrui la lingvon.

Dankon!



## ISIKAWA Tiekō, estro de Japania sekcio



Karaj ĉeestantoj de la 2a ILEI-Seminario en Orienta Azio,

Saluton! Mi estas Tiekō, kaj mi salutas vin ĉiujn en la nomo de la japania sekcio de ILEI.

Antaŭ du jaroj en ILEI-kunsido dum la lasta Azia Kongreso en Mongolio, ni tri sekcioj en Ĉinio, Koreio kaj Japanio interkonsentis, ke ni havu kiel eble plej ofte ŝancojn renkonti, por ke ni povu persone konatiĝi kaj interŝanĝi opiniojn kaj spertojn. Ĉar ni azianoj havas pli malpli similajn problemojn pri la instruado de Esperanto, ni pensis, ke interŝanĝi niajn spertojn gravas. Do, ni decidis okazigi ILEI-Seminaron en Orienta Azio, nome ISOA. Kaj al la 2a ISOA, al Kunming, venis sep japanoj, el kiuj ses estas membroj de ILEI.


Post la unua renkontiĝo en somero 2011, en la urbo Tianjin, okaze de Esperanto-Seminario de ILEI-ĈN, homoj de tiuj tri ILEI-sekcioj bone kunlaboras, kaj sinsekvos la tria ISOA en Koreio kaj la kvara en Japanio. Mi esperas, ke ni daŭre kunlaboru en edukaj kampoj, kaj espereble multigu novajn esperantistojn en Azio.

Dankon!

ISIKAWA Tiekō (estro de ILEI-JP)



## LEE Jung-kee, estro de Korea sekcio



Bonan tagon!

En la jaro 2010 en Ulanbatoro estis fakkunsido kun la nomo ILEI, kiun s-ino Mirejo prezidis. Tiam mi kun dorna voĉo atakis ILEI-on: ĉu ILEI forĵetis Azion? Mirejo tuj fidele raportis tion al sekretario kaj prezidanto de ILEI.

Tute strange, hazarde, post tiu akcidento azianoj vekiĝis, mi pensas, post longa dormado de Azio, laste, certe vekiĝis azianoj, precipe Ĉinio, Japanio kaj Koreio. La sukceso iras al la benito nia estimata prezidanto Stefan MacGil. Inter li kaj azianoj estis mistera spirita interligilo. Pro tio mi kore dankas al nia prezidanto. Kaj do la unua seminario estis en Tianĵin, jen tio estas fonda kunsido, kiun Profesoro Arko tre bone faris. kaj la dua, do hodiaŭ sufiĉe sukcesas. Fakte mi ne imagis ke el Koreio 8 ILEI-anoj partoprenis en tiu ĉi renkontiĝo, do ni provis kaj sukcesis kaj la 3-a finfine okazos en Koreio. Do mi nun anoncas, ke la 8-a Internacia Renkontiĝo de Meditado okazos januare, de la 18-a ĝis la 21-a, 3 noktojn kaj 4 tagojn. Nekredeble malmultekosta, 30 Eŭrojn inkluzivas programo, manĝado, loĝado, ekskurso kaj bankedo, ĉio. Do, tuj post tiu ĉi internacia meditado, korea sekcio okazigos la 3-an rekontiĝon de ISOA. Tio signifas, ke ni povas kapti du birdojn per unu ŝtono.

Se vi volus resti en la meditado, bone, kaj poste se vi volus ĉeesti en la 3-a ISOA, vi povas profiti du eventojn tre malmultekoste. Mi pensas, ke 2 eventoj estas aranĝitaj por vi. Bonvenon! Sed vi fikse memoru, ke la 3-a ISOA okazos de la 21-a ĝis la 24-a de januaro.

Do, finante, mi volas diri, ke tiuj, kiuj ne aventuras, nenion gajnos. Tiuj, kiuj semas kun larmo, kolektos kun rido kaj ĝojo. Ni daŭrigu nian paŝadon, ne nur por azia movado, sed por la tutmonda movado.

Koran dankon.




## GONG Xiaofeng, estro de Ĉina sekcio

Estimataj:

Hodiaŭ finfine okazas la 2-a ISOA kadre de nia ILEI-konferenco.

Ĉina sekcio nun jam havas 89 membrojn, ankoraŭ 2 junuloj deziras aliĝi.

Dum lastaj jaroj, ILEI-CN okazigis kelkajn seminariojn kaj E-kursarojn, somerajn kaj vintrajn. La 1-a Esperanto-seminario okazis en la jaro 2009, tuj post la restariĝo de Ĉina sekcio, kvankam nur 18 instruistoj partoprenis, tamen la etoso estis ege bona kaj tute esperanta. Do, ĝi estas la unuafoje vere esperantista kunveno.



La 2-a seminario okazis en la jaro 2010, en la urbo Taiyuan, sume estis 59 seminarianoj el 5 landoj. Ni okazigis la 1-an vintran E-kursaron en Hainan-insulo, 2010, la 2-an, en Guangzhou, 2011, kaj la 3-an ĉi-jare, en E-insulo. Estis 63 alilandanoj kaj 68 ĉinoj partoprenis nian E-kursaron ĉi-jare.

Por ke fortigu kontaktojn inter orient-aziaj landoj, pasintjare ni okazigis la 1-an ISOA-n en la urbo Tianjin, sume pli ol 70 personoj el 5 landoj (Koreio, Japanio, Mongolio, Brazilo kaj Ĉinio) partoprenis.

Do, dank' al ĉiuj membroj, pro la helpo kaj subteno, ĉina movado pri E-instruado funkcias bone. Ĉe la komenco de ĉi-jaro fondiĝis la Ĉina Ligo de Esperantistaj instruistoj. Tio estas prospero de nia afero.

Sukceson al la 2-a ISOA!

Koran dankon!



## Bharat Kumar CHAUDHARY, estro de Nepala sekcio



Bontan tagon al vi ĉiuj!

Gratulon al la okazigo de la 2-a ILEI-Seminario en Orienta Azio!

E-movado unuafoje atingis Nepalon en la 1950aj jaroj, Tibor Sekelj vojaĝis al Nepalo kaj instruis. Poste Simo Milosevic venis al Nepalo kaj ankaŭ instruis. Li fondis Esperanto-grupon, kiu daŭris iom da tempo kaj poste malaperis. En 1990 refoje venis Joacim Verdin el Pollando kaj li instruis Esperanton al ni. Mi estas unu el la fondintoj de Nepala Esperanto-Asocio. Kaj ekde tiu tempo ni havas viglan movadon. Pli kaj pli da gejunuloj interesiĝas pri nia lingvo. Ni konstante ricevis subtenon de eksterlandaj samideanoj, precipe, ekzemple, Hori Yasuo ĉiujare vizitas kaj gvidas la kurson. Ĉi-jare ankaŭ sinjorino Mireille planas viziti nian landon kaj ŝi senpacience atendas labori, kontribui al nia movado. Ni kore bonvenigas ŝin.

Ekde 1991 mi komencis instrui Esperanton kaj mi ne sciis la nombron, eble pli ol 2 mil homojn mi instruis ekde la tempo, mil ankoraŭ estas salutantoj kaj 500 povas komunikiĝi pere de Esperanto, pli ol 200 aŭ 300 vivas eksterlande, ne en Nepalo, plejparte en Aŭstralio, Usono, eŭropaj landoj kaj kelkaj en Japanio. Junuloj tuj interesiĝas lerni lingvojn kaj poste ili ne plu viglas, ĉar ekonomia situacio kaj politika situacio en Nepalo ne estas stabilaj. Nun ni havas pli-malpli 100 membrojn.

Rilate al tiu ĉi ILEI-konferenco, pri lingva rilato inter Esperanto kaj la nepala, oni pensas, ke la nepala lingvo estas en la indoeŭropa familio. Sed mi pensas, ke ne estas tiom multe da konektoj de Esperanto kaj nia gepatra lingvo nepala. Vi jam scias, ke Nepalo havas pli ol 70 malsamajn lingvojn, oni ne komprenas unu la alian. Ekzemple se mi iras al iu komunumo, kaj tio preskaŭ tiel, tiel (kun gestoj), mi sentas min kiel ĉi tie en Ĉinio. Kelkaj similas al barataj skribdevenaj kaj kelkaj de tibeta lingvo. Pro tio Nepalo estas iom publika lando (lingva afero).



## La 2-a ILEI-Seminario en Orienta Azio, Kunming, Ĉinio

Sed nepalanoj ne bezonas tiom multe da tempo por lerni lingvojn. Ekzemple mi havas kelkaj amikojn, kiuj lernis nur antaŭ kelkaj semajnoj, sed ili estas membroj de Nespa (Nepala Esperanto-Asocio) kaj subtenantoj. Ili aliĝas ĉiujare al nia asocio kaj mi pensas, ke ĉi-jare estas bone por inviti ilin kaj esperantistigi ilin ĝis Hanojo (nia bileto estas ĝis Hanojo). Do post Hanojo ili plue parolos en Esperanto, mi esperu.

Koran dankon!


### **Mireille Grosjean, el Svislando, sekciestro de Svisa ILEI Sekcio, omisiito de ILEI por akompani la kandidatighon de novaj sekcioj**

Mi parolas nome de ne-azianoj. Ni turnu nin al diversaj aliaj kontinentoj. Tre mallonge, kiam mi aŭdis la KER-ekzameno, KER estas komuna konferenca kadro, mi estis tute kontraŭa, ĉar mi ne vidis, ke Esperanto estu en organizigita en eŭropa stukturo kaj mi vere nevolis, poste oni aligis min, ke en tiu kadro estas la ĉina, la japana, la korea, la araba, kaj tiam mi



diris en tia principo, tia skipo, estas bone, ke Esperanto ankaŭ estu. ĉar por mi Esperanto estas tutmonda, devas esti tutmonda, mi venas de tre multlingva lando, mi sentas min en mia lando kiel fiŝo en glaso, en Eŭropo, kiel fiŝo en akvujo kaj nun en la mondo estas sufiĉe vasta porceano, ĉiuj mondcivitanoj. Dankon.

### **Ronald GLOSSOP, prezidanto de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, el Usono**



Mi estas la prezidanto de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto. Mi tre hontas, ke mi en Usono ne faras pli por Esperanto. Tamen mi volas gratuli vin, azianojn, ke vi bone provas, ke Esperanto estas lingvo por la tuta mondo. Do, mi multe gratulas vin.



## Prelegoj

# Efiko de parkera metodo

Yongsung PARK (Nema), Koreio



## Resumo:

### 1) Problemo

Lernanto ne povas teni tion, kion ili lernis en antaŭsemajna kurso.

Kompreni gramatikon bone, sed ne havas sufiĉan tempon ekzercadi

### 2) Solvo

Doni parkerindan frazon, kiu rezumas la lernaĵojn.

1 aŭ 2 frazojn la lernantoj povas ripeti. Ĉiam kaj ĉie.

### 3) Efiko

Lernanto ĉiam havas Esperantajn frazojn ripete elparoleblajn.

Mem elparoli donas memfidon al komencanto.

Gvidanto povas kontroli ilian prononcon pli bone.

### 4) Plua utiligo

Multe helpas parkeradi bonajn frazojn, kiuj enhavas modelajn frazformojn

Por ebligi daŭran parkeradon, ordigi la frazojn laŭ temoj estas grava punkto.

### 5) Ekzemplo

#1. Frazoj el Zamenhofa vivo (kun ĝiaj rakontoj)

Frazoj : elektitaj el Zamenhofaĵoj kaj ordigitaj laŭ temoj

Maniero : 2 frazojn en 1 semajno, dum 2 monatoj --> 16 frazojn.

Kune : Parkeri reciproke kun sia amiko

Efiko :

(1) Kutimiĝas al la frazformoj, boniĝas prononco, fluiĝas elparolo.

(2) Koniĝas kaj proksimiĝas al zamenhofaj pensoj el lia vivo.



En unuaj paŝoj de Esperanto-lernado, azianoj renkontas du obstaklojn, kiujn eŭropanoj eble ne konus. La bildon mi montris en la lasta jaro (\*la 1-a ISOA), komencantoj lernis kaj ĉi tie iom libere fluaj parolantoj, ĝuas en Esperantujo. Tamen al azianoj mankas iu ponto, kie estas la ponto? Alikontinentaj homoj, eŭropanoj, aŭ latinaj homoj, ili post la baza klaso, kompreninte la gramatikon de Esperanto, Ili ne sentas plu murojn, sed aziaj lernantoj ne, ili devas transsalti kelkajn murojn plu.

Unu estis la vortaro. Jen admira PIV estas tiel peza vortaro, mi estas ŝokita por kompreni. Ili komprenas nur evidenton 60-70%, ĉu vere? Ĉu eŭropanoj nur ripetas vortojn esperantajn? Ili povas kapti la signifon. Sed azianoj sentas vortojn tute fremdaj. Ili pensas, ke vortoj havas flugilojn, ĉiam malaperas. Pro tio, mi proponis, ke aziaj esperantistoj havas bazan vortaron de oficiala akademio.

parkere en la vortoprovizo.

Estis lasta laboro, la unua muro estis por legi kaj kompreni, tion ni povas venki per baza radikaro oficiala minigita por vortaro kaj pri la dua muro mi volas paroli hodiaŭ ĉar multaj aziaj esperantistoj renkontas muron enbuŝigi Esperanton, Kial? Gramatikon kaj vortaron ni bezonas por aziaj anoj, kial balbutas? Kiam balbutas? Komencantoj povas legi kaj kompreni frazojn de baza konversacio, sed komencantoj balbutas en reala babilaĵo. Ĉar ilia cerbo nun konstruadas franzojn. Mi volas paroli pri la dua obstaklo.

Mi prezentas al vi 3 ekzemplojn.

### **#ekz 1 Frazformo:**

Mi renkontis japanan amikon, s-ro Nakakaŭa Kuniniko, en lasta jaro, li estis 64 jara, malalta nivelo. Sufiĉe malalta. Li lernis novan lingvon kaj mi estis iom ŝokita ĉar li volis paroli kun mi. Li eklernis Esperanton antaŭ nur unu jaro kaj mi kun scivolemo demandis al li. Esperanto estas lia unua fremda lingvo, ĉar li konas nur la ĉinan lingvon, ne la anglan lingvon, ne aliajn fremdajn lingvojn. kaj li ne kapablas uzi komputilon, ne skajpon, kaj ne kontakti kun alilandaj esperantistoj.

“Do, kial vi povas elparoli en Esperanto?”

“Mi studis pri la metodo de s-ino Tahira Masako, ankaŭ maljuna sinjorino”.

Ŝi prezentis al li taŭgan metodon. Ŝi donis al li la ekzercaron “Fundamento de Zamenhof” kaj ĉiutage antaŭ enlitiĝo, li laŭtleĝis ĝin unu horon. Tiam mi vidis, ke ĉiam li kunportis la libron “Fundamento de Zamenhof” kaj la ekzercaron. Mi diris, ke li jam 40 fojojn legis. Ĉar mi pensis, ke li estis ekzerci ĉiam, do mi iom studis pri ĝi. “Ekzercaro de Esperanto” estas frazformaj materialoj de d-ro Zamenhof. Kiom da vortoj ĝi enhavas?

Frazformaj modeloj

Pri la vortoj en la ekzercaro, laŭ la akademia vortaro, la 2-a, 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a estas por komencantoj. En tiu ĉi niveloj oni povas senprobleme paroli. Nombro de vortoj en la ekzercaro de Zamenhof en Nivelo 2 mi kalkulis kaj studis. Ekzercaro de Zamenhof enhavas



vortojn por komencantoj, entute 587 vortoj estas en la ekzercaro kaj tio ebligas al li paroli senprobleme.

Ŝlosiloj por li: Sufiĉaj vortoj por bazaj konversacioj.

## **#ekz 2 Doni parkerindajn frazojn al niaj komencantoj.**

Estas plej interese kaj grave. Ĉu vi nun povas imagi kiom ĝi signifas en tiu ĉi bildo? En kurso oni bone lernas kaj poste kun flugiloj ĉio flugas. Estas nature. Niaj komencantoj unu semajnon poste, unu monaton poste, ili komprenas gramatikon kaj povas legi kaj kompreni. Ne povas paroli mem multaj azianoj. Tre grava. En kurso ni lernas, ni renkontas Esperanton sed ekster kurso ni veturas kaj renkontas la homojn. Kaj en metroo kion oni pensas? aŭ antaŭ enlitiĝo?

En kurso eble ni havas unu horon aŭ du horojn, en unu semajno, tamen multaj minutojn, sekundojn, nia cerbo ne pripensas pri Esperanto en kurso. Se ni lernas la gramatikaĵon per unu horo kaj por eksterkurso, ni donu al komencantoj parkerindajn frazojn, estas ekzemplo:

Mi estas lernanto de Esperanto, Esperanto estas bona kaj neŭtrala lingvo.

Iun frazon nia komencanto povas libere parkeri, kiam li staras en metroo aŭ iam li renkontas ne-esperantistan amikon, do li povas paroli Esperanton. Li ne necesas konstrui frazojn, ĉar ili jam estas en la cerbo.

Bonaj punktoj de parkerado:

1. Ĉiam eblas
2. al kutimiĝas al “frazformoj”
3. “Mem” enbuŝigas

## **Ekzemple**

Dolora Amo (1882), #1-1

Jam dum preskaŭ dudek jarcentoj nia popolo migras tra la vasta mondo. Sen patrujo, sen hejmo.

Forŝrante sin de cionismo (1914) #1-2

Ni malgraŭ la korŝantaj suferoj de mia gento, ne volas ligi nin kun hebrea nacionalismo sed mi volas labori nur por interhoma ĵusteco absolute.

.....

Efikoj

1. al lernanto-----interesiĝon, kuraĝon
2. al gvidanto-----kontroli gramatikon kaj prononcadon

## **#ekz 3 Parkere! Ĝin mi mem memoris.**

Post baza klaso, mi volis fari iujn parkerindaĵojn. Ili estas 16 frazoj. Mia intenco estis:



## La 2-a ILEI-Seminario en Orienta Azio, Kunming, Ĉinio

1. Mi volas havi “bonajn frazojn” por ke ni povu ĉiam parkeri enbuŝe.
2. Membuŝe parkerante, niaj langoj pli kaj pli al kutimiĝas al frazformoj.
3. Estus bone por bonprononce paroli “Esperante” ankaŭ al ne-esperantistoj.

Trajto de 16 parkere

1. Aranĝi frazojn laŭteme----doni rakonton necesan por memori
2. Frazoj de la unua persono----enhavas sufiĉe da frazformoj
3. Tra la vivo de d-ro Zamenhof---indas memori

Aktuala apliko

- a) 2 frazojn en 1 semajno, dum 2 monatoj --> 16 frazojn.
- b) Grupete
- c) Utiligi grupan tujmesaĝilon estas bone.


Rezulto:

1. Ĉiutage kun Esperanto
2. Interesiĝas pli kaj pli pri Esperanto
3. Boniĝas prononco
4. Malmoliĝas langoj
5. Kreskas memfido
6. Multiĝas kontaktoj kun geamikoj
7. Kaptita de Zamenhof

(ordigi la tekston laŭ la sonregistraĵo)

## **Interesaj metodoj por instrui Esperanton al infanoj**

**Li Weilun (el Ĉinio)**



Intereso estas la plej bona instruisto. Kun intereso infanoj ĝoje kaj bone lernas Esperanton. Pro tio ni devas uzi interesajn metodojn dum instruado. Pri kio interesiĝas infanoj? Kiujn karakterizaĵojn ili havas? Ili ŝatas kanti, danci, ludi, desegni, moviĝi, deveni, imagi ktp. Ili estas scivolemaj kaj superemaj. Ni devas uzi metodojn laŭ iliaj intereso kaj karakterizaĵoj.

Infanoj ŝatas kanti. Ni devas instrui Esperanton al ili per kantado. Kantado povas altigi ilian intereson, helpi ilin memori vortojn kaj vigligi la lernadon. Ni povas elekti komponitajn kantojn kaj komponi novajn kantojn aŭ necese. Ekzemple, por instrui esprimon pri aĝo, mi komponis kanton “Kiomjara?”: Kiomjara estas vi? Ses-jara. Kiomjara estas li? Sep-jara. Kiomjara estas ŝi? Ok-jara. Por instrui verbojn “kanti, danci, kuri kaj salti” mi komponis la kanton “Kion faras vi?”: Kion faras vi? Kantas ni. Kion faras vi? Dancas ni.



Kion faras vi? Kuras ni. Kion faras vi? Saltas ni. Por lerni nomojn de besto, meblo, frukto, arbo ktp, infanoj povas kanti: Hundo, hundo estas besto. Ankaŭ kato estas besto. Tablo, tavolo estas meblo. Ankaŭ seĝo estas meblo. Pomo, pomo estas frukto. Ankaŭ piro estas frukto. Pino, pino estas arbo. Ankaŭ popolo estas arbo. Ni ankaŭ povas uzi la muzikon de iu kanto kaj ŝanĝi la tekston. Ekzemple, la kanto “Birdo kaj fiŝo”: Birdo flugas, birdo flugas antaŭ ni, antaŭ ni. Al ni plaĉas birdo, al ni plaĉas birdo, plaĉas ĝi, plaĉas ĝi. Fiŝo naĝas, fiŝo, plaĉas ĝi, plaĉas ĝi. Alia kanto “Nia granda familio”: Ludas mi, Ludas vi. Ludas li. Ludas ŝi. Ĝoje, kune ludas ni. Nia granda familio. Ĉie regas harmoni, Ni feliĉe ĉiuj vivas tie ĉi.

Infanoj ŝatas ludi. Ni devas instrui Esperanton al ili per ludado. Ludado ĝojigas infanojn kaj vigligas la lernadon. Ekzemple, por lerni organojn sur la kapo, instruisto diras la nomon de iu organo (okulo, orelo, nazo, buŝo...), kaj infanoj devas montri tiun organon. Por lerni ciferojn 1-10, instruisto elektas dek lernantojn. Ĉiu el ili elektas unu ciferon de iu ajn lernantoj. Tiu faras la samon. Por restudi kelkajn vortojn instruisto desegnas iliajn figurojn en du flankoj de la nigra tabulo. La instruisto diras la vortojn kaj du lernantoj montras la figurojn. Tiu, kiu montras ĝuste kaj pli rapide, gajnas unu poenton. Por restudi vortojn ni povas fari ludon de vortoformado. Ekzemple, instruisto anticipas skribas literojn aŭ silabojn de iu vorto sur kartoj kaj petas kelkajn lernantojn formi vorton. Tiu, kiu formas ĝuste kaj pli rapide, gajnas unu poenton.

Infanoj ŝatas desegni. Ni povas diri kelkajn vortojn kaj petas infanojn desegni sur la nigra tabulo aŭ sur paperoj. Ekzemple, desegni sunon, lunon, tablon, seĝon, domon, boaton, pomon, piron, arbon, floron ktp. Ni povas desegni kapon sur la nigra tabulo kaj petas infanojn aldoni buŝon, nazon, okulojn, harojn ktp. Ni povas legi mallongan tekston kaj petas infanojn desegni. Ekzemple, la teksto povas esti tia: jen monto. Sur la monto estas domo. Antaŭ la domo estas du arboj. Unu estas alta kaj la alia estas malalta.

Infanoj ŝatas moviĝi. Ili ne povas sidi senmove dum longa tempo. Ni devas igi ilin ion fari. Ekzemple, en ekzercado de verboj instruisto povas ordoni siajn lernantojn kanti, danci, kuri, salti, manĝi, trinki, stariĝi, sidiĝi, ridi, plori, lavi la vizaĝon, brosi la dentojn ktp. Por praktiki la sufikson “-in-”, instruisto diras “knabo, lernanto, filo, frato...”, la knaboj devas levi la manon. Instruisto diras “knabino, lernantino, filino, fratino...”, la knabinoj devas levi la manon. Por lerni la vortojn “libro, kajero, krajono, librujo”, instruisto diras vortojn kaj lernantoj levas objektojn.

Infanoj estas scivolemaj. Ni devas uzi tion por veki ilian aktivecon. Ekzemple, ni povas skribi literojn, silabojn, vortojn aŭ desegni figurojn sur kartoj kaj elektas unu karton petante ke la lernantoj laŭvice divenu. Alia ekzemplo: instruisto metas kelkajn objektojn en sakon kaj petas siajn lernantojn diveni. Alia ekzemplo: instruisto povas pensi iun ciferon kaj petas siajn lernantojn diveni. Se iu lernanto diras ciferon pli grandan, la instruisto diras “malpli”, se iu lernanto diras ciferon malpli grandan, la instruisto diras “pli”, ĝis kiam la cifero estas ĝuste divenita. Kompreneble, lernantoj povas diveni enigmojn. Jen kelkaj enigmoj:

1. Mi estas frato de tiu homo, sed tiu homo ne estas mia frato. Kiu estas tiu homo? (Mia



fratino)

2. Inter tri homoj estas du patroj kaj du filoj. Kiuj ili estas? (Avo, patro kaj filo)

3. Du homoj sidas antaŭ unu homo. Du homoj sidas malantaŭ unu homo. Unu homo sidas en la mezo. Kiom da homoj estas? (Tri homoj)

4. Ĝi estas sur la ĉielo, sed ne estas sur la suno, nek sur la luno, nek sur la steloj. Kiu vokalo estas? (i)

5. Ĝi aperas dufoje en momento kaj unufoje en minuto. sed neniam aperas en cent jaroj. Kiu konsonanto estas? (m)


Infanoj ŝatas imagi. Ni devas ekspluati ilian imagipovon. Ekzemple, instruisto desegnas rondon sur la nigra tabulo kaj demandas kio ĝi estas. La respondoj povas esti diversaj: rondo, kapo, buŝo, okulo, suno, luno, tero, pilko, disko, telero, pomo, oranĝo, mandarino, ovo, melono, akvomelono, vinbero, ktp. Alia ekzemplo: Instruistoj diras ke li havas filon kaj demandas kia li estas. La respondoj povas esti: (mal)alta, (mal)dika, (mal)bela, (mal)forta, gaja, saĝa, diligenta, helpema, laborema ktp. Alia ekzemplo: Instruisto montras dorsoflankon de papero kaj diras ke sur la papero estas familio. La instruisto unue demandas kiom da personoj estas kaj poste demandas kion ili faras.

Infanoj estas superemaj. Ni povas fari konkursojn dum instruado. Fakto montras, ke en konkurso infanoj fariĝas pli aktivaj kaj pli viglaj kaj la lernado fariĝas pli interesa.

Kompreneble, bildoj, sonbendoj, videoj kaj filmoj povas igi instruadon pli interesa. Pri tio mi ne volas pli multe paroli.

## **Instrui Esperanton al Azianoj**

HORI Jasuo (Japanio)



Ne troviĝas metodo specifa por azianoj. Azio estas tro granda kaj eĉ difini, kio estas Azio, estas malfacile. Tial mi parolis ĝenerale.

### **1. Kio estas grava por instrui**



## La 2-a ILEI-Seminario en Orienta Azio, Kunming, Ĉinio

Ĝenerale oni opinias, ke tekniko estas grava. Sed laŭ mia opinio tekniko estas la plej lasta. Laŭ la graveco jene viciĝos eroj rilate al instruado:

1) Homa forto (bona karaktero, forta impresio, fidindeco, ktp.)

Sen tiu forto lernantoj ne volas lerni serioze tion, kion tiu instruisto volas instrui.

2) Filozofio

Se instruistoj ne havas filozofion (kial ili instruas, laŭ kiu vidpunkto ili instruas), ilia instruado ne interesas lernantojn. Kiam ili instruos, unue ili devas pensi, por kio kaj kial ili instruas.

3) Scio

Memkompreneble sen sufiĉe da scio, instruistoj ne povas instrui.

4) Materialoj

Materialoj devas esti elektitaj laŭ la filozofio de instruistoj. Bona materialo interesas lernantojn, sed malbona, ne. Materialoj devas havi enhavon kaj por lingva scio kaj por klerigado. Rilate al Esperanto, materialo devas enhavi klerigaĵon por Esperanto.

5) Tekniko

## **2. Teknio aŭ Metodo**

1) KLM

Ĝi ne estas la nomo de la nederlanda flugkompanio, ĝi signifas K=klare, L=laŭte, kaj M=malrapide. Tiuj estas principo por parolado, sed por instruado ankaŭ ili estas gravaj. Instruistoj devas klarigi, skribi kaj paroli klare, paroli laŭte, kaj paroli kaj instrui malrapide, rigardante mienon de la lernantoj.

2) UEA

Kio signifas UEA? Vi mem divenu.

3) Ne tuj respondu por pensigi lernantojn

Iuj instruistoj ne povas atendi. Atendi estas grave. Eĉ kiam venas tuj la ĝusta respondo, ne agnosku tion ĝusta. Plu demandu al aliaj lernantoj, kaj dume pensigu la lernantojn. Ĉiam metu la temon meze de la lernantoj. Antaŭ ol klarigi, pensigu lernantojn, simple uzante vorton "Ne", ĝis lernantoj atingos la ĝustan respondon.

4) Kantoj

Kantoj gajigas la etoson, do tre gravaj. Instruistoj mem lernu kantadon kaj ne hezitu kanti. Se ili ne estas lerta en kantado, ili trovu alian manieron. Ili uzu sian lertan kampon por la klaso.

5) Montru Esperantaĵojn kaj involvu lernantojn en la movadon

Nia celo estas insturado de Esperanto, do instruistoj mem devas labori por Esperanto kaj ĝui la fruktojn. Rigardante tiajn instruistojn, lernantoj volas sekvi ilin kaj lernas serioze.



## Ĉu Cseh-metodo taŭgas al Ĉina komencanto?



Cseh-metodo estas ofte uzata en Eŭropo kaj Ameriko. Ĉu ĝi ankaŭ estas taŭga por ĉinaj komencantoj?

Mi komencis lerni Esperanton en la komenco de la 80aj jaroj en la pasinta jarcento. Ekde tiam mi legis la artikolojn pri diskutoj kaj debatoj de Cseh-metodo en Ĉinio. Mi instruas Esperanton jam pli ol 25 jarojn kaj mi opinias, ke Cseh-metodo ne taŭgas por ĉinaj komencantoj, kiuj neniam lernis Esperanton aŭ aliajn fremdlingvojn. Esperanto estas kreita baze de eŭropaj lingvoj. La prononco kaj skribo inter la ĉina lingvo kaj Esperanto estas grandaj diferencoj. Ĉino malfacile lernas eŭropajn lingvojn kaj ankaŭ eŭropanoj malfacile lernas la ĉinan. Kvankam oni diras, ke Esperanto estas facile lernebla, tamen por ĉino (ankaŭ orientaj azianoj) Esperanto ankaŭ estas malfacile lernebla kiel aliaj eŭropaj lingvoj.

Eŭropanoj rekonas en Esperanto multajn vortojn, ĉar ili ekzistas en tia aŭ alia formo en iliaj lingvoj. Por ĉino ĉiu Esperanto-vorto estas fremda. Ekz: studento, tablo, libro, radio, familio, verda, simila, ami, kompari, kapti ktp. Eŭropanoj pli facile komprenas la signifon de la skribo aŭ prononco. Tamen tio por ĉino estas tute fremda, oni devas parkerigi ĉiun vorotn en la kapon. Ekz: ĉino neniel povas rilatigi la vorton “studento” al 学生 (學生), “libro” al 书 (書) ktp. Ĉina skribo montriĝas per 8 bazaj strekoj: 丶, 一, |, 丿, ㇏, ㇑, ㇒, ㇓. La skribo de Esperanto konsistas el latinaj literoj. Jen, inter la ĉina lingvo kaj Esperanto estas granda diferenco!

Mi helpis plurajn fremdajn esperantistojn instrui Esperanton en Ĉinio, ekz: Roman Dobrzynski, fama pola esperantisto kaj eksa vicprezidanto de UEA, estis invitita de ĉina privata universitato en 2006 por instrui Esperanton al ĉinaj studentoj. Mi estis lia asistanto dum la instruado en Beijing. Roman instruis nur Esperante kaj mi instruis laŭ ĉina tradicia



metodo. Ni ambaŭ kunlaboris dum la instruado. Post tri monatoj Roman konfesis, ke oni malfacile instruas Esperanton per Cseh-metodo al ĉinaj komencantoj. Fininte la lernadon de Esperanto-kurso, gestudentoj nur povis fari simplan interparolon kun Roman sen mia interpreto. Roman skribis artikolon al la revuo Esperanto (UEA) pri lia sperto en Ĉinio. Li skribis: “Jen modifita Cseh-metodo. Ŝajnas al mi, ke pro manko de analogio inter Esperanto kaj la ĉina lingvo estus malfacile apliki Cseh-metodon en ĝia klasika formo.”

Mi kaj korea amiko Ma Young-tae (membro de Akademio de Esperanto) kune gvidis someran E-kurson en Harbino somere, 2009. La kursanoj ne estis komencantoj, ili jam lernis 10 lecionojn antaŭ nia atingo al Harbino. S-ro Ma ne bone parolas la ĉinan lingvon kaj mi devis fari klarigojn dum la instruado. Li rekte instruis en Esperanto. Tio nur helpis altigi la parolan kaj aŭskultan kapablojn de studentoj.

En lastaj jaroj Dennis Keefe ofte instruas Esperanton al ĉinaj lernantoj. Multaj el la lernantoj jam havis bazajn sciojn pri Esperanto kaj ili jam lernis la anglan lingvon pli ol 10 jarojn. Tamen sen helpoj de ĉinaj esperantistoj, ĉu li povus bone instrui Esperanton al ĉinaj komencantoj? Foje li diris al Arko (estro de ILEI-ĉina sekcio): “Ho, finfine vi venas! Vi savas mian kurson!”

La menciitaj ekzemploj montras, ke oni ne povas rekte uzi Esperanton en la instruado de Esperanto en Ĉinio. Cseh-metodo bone helpis la lernantojn, kiuj jam havas bazan scion de Esperanto en parolado kaj aŭskultado.

Dum mia instruado de Esperanto, mi uzas miksan metodon al studentoj. Unue mi instruas al ili bazajn lecionojn laŭ ĉina maniero. Mi klarigas la signifojn pri novaj vortoj, frazoj kaj gramatikoj ĉine. Poste mi uzas simplajn frazojn esperante. Komence mi nur iomete paroli esperante kaj iom post iom pli multe.

Ni, ĉinaj esperantistoj multe dankas, ke multaj alilandaj samideanoj donis grandajn helpojn en la instruado de Esperanto en ĉinaj universitatoj, mezlernejoj kaj elementaj lernejoj. Pro iliaj helpoj, multaj ĉinaj lernantoj altigis siajn nivelojn en parolo kaj aŭskulto de Esperanto kaj havas bonan ŝanĉon praktiki nian lingvon.



## **Signifoplena provo de esperanta instruado por ĉinaj infanoj**

Wei Yubin (Ĉinio)



Karaj gesamideanoj, mi venas de norda Ĉinio, kaj laboras kiel elementa lernejestro, hodiaŭ mi volas raporti al vi pri la instruado de Esperanto en nia lernejo.

Nia elementa lernejo situas en la urbo Taiyuan, provinco Shanxi. La lernejo estas fondita de registaro. Ĝi havas 1300 lernantojn, kaj 24 klasojn en ses lernojaroj.

En Ĉinio la elementlerneja edukado ĝenerale komenciĝas de ses-aĝuloj. La ŝtato praktikas 9-jaran devigan edukadon al aĝotaŭgaj geknaboj. La sistemo de elementa eduko konsistas el du partoj, la unua daŭras 6 jarojn kaj nomiĝas "小学" elementa lernejo kaj la dua, tri jarojn "中学", mezlernejo. La ĉefa programo en la elementa lernejo enhavas ĉinlingvon kaj literaturon, matematikon, sciencon, anglalingvon, moralon, muzikon, sporton ktp. Sed por la infanoj la plej malfacila programo estas la angla lingvo, kio multe doloras la infanojn kaj iliajn gepatrojn.

Estas ege stranga la fenomeno en Ĉinio, ke ĉie aktivas kursoj de la angla lingvo. Post la lernejaj horoj gepatroj devige sendas kaj akompanas siajn infanojn al anglilingvaj kursoj. Eĉ tiel oni ankoraŭ ne povas bone posedi ĝin ĝis universitata diplomiĝo. Pro tio ili perdas multe da tempo, en kiu ili povus uzi en lernado de la patrina lingvo kaj fakaj scioj. Wu Qidi, ĉina vicministro pri edukado, komentis lernadon de la angla lingvo kiel "tempo-raba kaj malmulte frukta".

Kie estas la vojo de fremdlingva lernado en Ĉinio?

Ni turnas nian atenton al Esperanto.

En printempo 2008, ni okazigis Esperanto-kurson kun jenaj celoj:



## La 2-a ILEI-Seminario en Orienta Azio, Kunming, Ĉinio

Unue, fari eksperimenton por konfirmi propedeŭtikan efikon de Esperanto por ĉinaj infanoj.

Ni funkciigas E-kurson en nia lernejo kiel eksperimenton ĝuste por konfirmi ĝian propedeŭtikan valoron por ĉinoj en estonta lernado de la eŭropaj lingvoj. Kvankam la lernofaciliga efiko de Esperanto jam konfirmiĝis en multaj eŭropaj landoj, tamen en Ĉinio oni ne faris tian eksperimenton, nek statistikojn pri tiu afero. Do mankas al ni studo kaj raporto pri tiu laboro surbaze de solidaj esploroj. Tial nia klopodo estas signifoplena, malgraŭ tio, ke nia marŝo ankoraŭ ne estas forta.

Due, malfermi novan fenestron, por ke la infano pli vaste konu la mondon.

Pro disvolviĝo de informo-tekniko, la mondo pli kaj pli malgrandiĝas kiel tergloba vilaĝo, kaj la internacia komunikado neniam estas tiel vigla kaj tiel aktiva kiel hodiaŭ. Do estas necese kaj urĝe posedi fremdajn lingvojn por komunikiĝi kaj kontaktiĝi kun homoj el antipodo de la mondo. Ju pli multe ni kontaktas kun aliaj, des pli bone ni konas la mondon. Sed bedaŭrinde la fakto estas, ke oni povas bonege posedi nur malmulte da lingvoj. Por ĉinoj posedi eŭropajn lingvojn signifas penigan cerbumadon, ĉar ili devas eliri ekster la kadron de sia propra lingvosistemo, kiu estas plantita en la infanaĝo kaj estas tute malsimila ol al la lernata lingvo. Transiri tiujn limojn estas malfacile. Ekzemple: En Eŭropaj lingvoj oni davas meti demandajn vortojn ĉiam ĉe la kapo de la frazo, sed en la ĉina lingvo ĝi povas esti metita aŭ ĉe la kapo de la frazo, aŭ ĉe la mezo, aŭ ĉe la fino. Do la simpleco de Esperanto donas al ni ponton por pli efike alproprigi eŭropajn lingvojn. Eĉ se oni ne volas lerni pli da fremdaj lingvoj, Esperanto mem ja povas roli en komunikado kun alilandoj. Laŭ nia plano, la infanoj lernas Esperanton kiel devigan lingvon ĝis la sesa lernojaro. Tiam ili povus bone posedi ĝin.

Krom la supre menciitaj kialoj, mi havas alian intencon, ke ni volas baki esperantistojn por loka E-movado. E-movado en Taiyuan-urbo iam estis tre vigla. En la jaro 1930 veterano de Kuomintango Jing Meijiu jam fondis Taiyuan-an E-asocion; En la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento Taiyuan-a radiostacio funkciigis E-kurson, kaj aperis ne malmultaj eminentaj esperantistoj, el ili kelkaj ĝis nun ankoraŭ viglas en Esperantujo, ekzemple profesoro Wen Jin'gen, majstra monaĥo Miaohui, kiu instruas Esperanton en monaĥejo, kaj starigis Esperanto-retpaĝaron *Esperanto kaj Budhismo*, ktp, sed tamen estas ege bedaŭrinde, ke ili jam delonge transloĝiĝis en aliaj urboj, nun en nia urbo la nombro de esperantistoj povas kalkulebla simple per manfingroj. Do estas necese kulturi novan forton por loka E-movado. Nun en nia lernejo jam estas tri Esperanto-instruistoj, kiuj trapasis la ekzamenon B1 de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro.

Pro la supraj pripensoj ni faras projekton por la eksperimento.



Laŭ nia plano, la Esperanto-kurso komenciĝas je ĉiu komenca lernojaro. Kaj el ĉiu komenca lernojaro ni elektas unu klason kiel eksperimentan klason kaj daŭrigas Esperanto-lecionon ĝis la lasta lernojaro. Nun ĉirkaŭ 270 infanoj lernas Esperanton en deviga kurso du lernohorojn ĉiusemajne. Ĉiu-foje kiam la nova kurso komenciĝas, ni prezentas bazajn sciojn pri Esperanto al la gepatroj de la lernontoj. Kiam ili scias, kio Esperanto estas kaj kial ni instruas ĝin al la infanoj, ili esprimas subtenon al la decido de la lernejo, kaj kelkaj el ili eĉ decidas lerni Esperanton kune kun siaj infanoj.

En la jaro 2010, ni okazigis someran trejno-kursojn kaj seminarion de Esperanto dum someraj ferioj. Ankaŭ fremdlandanaj esperantistoj partoprenis. Ekzemple profesoro Ronald. Li du fojojn vizitis nian lernejon por lernigi infanojn kaj instruistojn. Oni ankoraŭ memoras liajn lecionojn "La Bela Planedo" kaj "Ruĝa Pomo". Ĉina veterana profesoro-esperantisto Li Weilun, kompilinto de la lernolibro *Moderna Esperanto por Infanoj*, persone donis lecionojn al niaj infanoj kun granda entuziasmo. Ĉar li delonge studas pri edukado al infanoj, kaj samtempe estas kompilinto de lernolibro, liaj lecionoj fariĝis niaj modeloj. La du energiaj maljunuloj donas al ni profundan impreson.

Nun nia projekto jam listiĝis en la eksperimentan projekton de Eduka Akademio de Shanxi-provinco. La lokaj eduko-departementoj donas grandan atenton al ĝi.

Jenaj atingoj de nia instruado de Esperanto.

Unu. La infanoj kiuj lernas Esperanton povas gajni pli altajn lernopontojn.

Ĉinaj lernejoj uzas la sistemon de notoj sur 100 poentoj, kun 60 poentoj kiel la noto de sukceso. Jen la tabelo. Ni elmetas la notojn de la infanoj en la kvara lernojaro. En ĉiu lernojaro estas paralelaj kvar klasoj.

Notoj pri la angla lingvo de la infanoj en la kvara lernojaro.

| klasoj | personoj | plej bonaj poentoj | mezaj poentoj |
|--------|----------|--------------------|---------------|
| 1 ☆    | 64       | 92.06%             | 97            |
| 2      | 63       | 70.31%             | 91.9          |
| 3      | 63       | 62.90%             | 89.2          |
| 4      | 63       | 79.37%             | 93.6          |

La tabelo klare montras, ke la unua klaso, kiu lernas Esperanton, havas plialtajn poentojn, almenaŭ je pli ol 3 poentoj.

Du. La infanoj kiuj lernas Esperanton estas pli parolemaj kaj pli multe interesiĝas pri aferoj de aliaj landoj. Estas iu knabino, kiu lernas la anglan lingvon jam de infanĝardeno, kaj



## La 2-a ILEI-Seminario en Orienta Azio, Kunming, Ĉinio

iam estis lernanto de profesoro Ronald, ne kuraĝis paroli en la angla lingvo. En la jaro 2010, seminario de ILEI-Ĉinio okazis en nia lernejo. Ŝi eklernis Esperanton ekde tiam kaj partoprenis kurson gvidatan de Ronald. Poste, ŝia patrino diris al mi, ke depost lernado de Esperanto ŝia filino fariĝis pli vigla en eksterlerneja kurso de la angla lingvo, kaj kuraĝas paroli angle kun sia instruisto. Estas certe, ke ĉi tio ne estas unika ekzemplo.

Instruistoj rimarkas, ke infanoj en Esperanto-kurso pli interesiĝas pri aferoj en fremdaj landoj. Ili konas diverslandajn flagojn, kaj aŭdas pri multaj lingvoj, kelkaj el ili pentras terglobon kun divershaŭtaj infanoj por esprimi siajn infanan amikecon. Esperanto ja larĝigas ilian vidkampon.

Estas certe, ke nia laboro ankoraŭ ne multe rikoltas, kaj ekzistas multaj problemoj, tamen ni kuraĝe komencas kaj firme kontinuigas la projekton. Ni esperas, ke esperantistoj subtenu nian laboron. Viaj proponoj kaj helpoj estas ĉiam bonvenaj.

## Komento

La 2-a ISOA, kvankam ĝi okazis en la kadro de la 45-a ILEI-Konferenco kaj estis nur duontaga programo, estis interesa kaj sugestoplena por mi. Mi atente aŭskultis prelegojn de ĉiuj parolantoj, kies temoj rilatas al la ĉeftemo “Instrumetodo por azianoj”.

Unu celo de nia komuna seminario, laŭ mia kompreno, estas ekkonscii similajn malfacilaĵojn en Esperanto-instruado por orientazianoj kaj kunlabori por trovi plibonajn metodojn/manierojn. Jam dum la 1-a ISOA montriĝis kelkaj aspektoj de tiuj malfacilaĵoj, kaj ĉi-foje kelkaj parolis pri konkretaj manieroj kiujn ili mem praktikas: s-ro Park Yongsung utiligas “Ekzercaro de Esperanto”-n por parkere lernigi bazajn vortojn al lernantoj, s-ro Li Weilun komponis kantojn por memorigi al infanoj multajn nomojn, kaj s-ro Hori Jasuo parolis pri gravaj punktoj kiam oni paroligas homojn.

S-ro Liu Baoguo konkludis, ke Cseh-metodo ne taŭgas por komencantoj en Ĉinio. Cseh-metodo estas unu el la ŝatataj kaj ofte efikaj instrumetodoj por eŭropanoj, sed en aziaj landoj tio bedaŭrinde ne tiom taŭgas. Ni bezonas iom da tekniko kiam ni uzas rektan metodon.

La raporton pri la provinstruado de Esperanto en elementa lernejo en la urbo Taiyuan mi aŭskultis kun granda intereso, ĉar mi vizitis la lernejon kaj havis ŝancon instrui nian lingvon tie antaŭ du jaroj. S-ro Wei Yubin raportis, ke lernantoj kiuj lernas Esperanton gajnis pli altan poenton en la lernado de la angla, kaj ke ili scias multon pri ekz. geografio ol aliaj lernantoj kiuj ne lernas Esperanton. La provo por montri lernofaciligan efekton de Esperanto ŝajne sukcesas. Mi atendas plian raporton de la projekto.



Fine de la seminario, s-ro Stefan MacGill montris sian instrumodelon, ke oni koncentriĝu je verboj kaj formu malgrandajn, simplajn vortojn. Tiu principo sendube gravas, sed ne ĉiuj povas fari same kiel li. Li insistis, ke ni ne tro emfazu mankon de vortoprovizo, tamen tio ja estas problemo por ni azianoj.

Dankon al ĉiuj prelegantoj, kaj ankaŭ al la organizantoj en Kunming!

ISIKAWA Tiekio (Japanio)



La 2-a ILEI-Seminario en Orienta Azio, Kunming, Ĉinio





La 2-a ILEI-Seminario en Orienta Azio, Kunming, Ĉinio



**BONVENON AL LA 3-A ISOA!**